★

# Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Karaj gesamideanoj,

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno

Temo

## Kodaj Nomoj

**Gvidos: Fransoazo Oazo, Milan Kolka**

Kodaj nomoj (angle Code Names, ĉeĥe Krycí jména) estas ĉeĥa tabla vortludo de Vlaada Chvatil. La ludo estas monde populara, ĝi jam estis eldonita en 30 lingvoj, ne nur eŭropaj. Ĉar dum pandemio ne eblas ludi en ludklubejoj, eldonisto de la ludo lanĉis retan version de la ludo. Nia klubo tradukis la retejon kaj vortojn.

Ni trovis, ke en Fracujo estas esperantista grupo, kiu ludas Kodajn Nomojn rete. Ni estas feliĉaj, ke nia laboro estas utila kaj la ludo estas ludata. Feliĉe ni ankaŭ trovis, ke la francoj ludas en la sama tempo, kiam okazas renkontiĝo de nia klubo.

Tial tiu ĉi reta renkontiĝo estos vere internacia, ni kuniĝos al grupo de Fransoazo Oazo.

Detaloj pri tiu aranĝo vi vidos en evento de ĉeforganizanto:

https://eventaservo.org/e/bbc474

Ligilo al ZOOM-sesio: https://us02web.zoom.us/j/9473053822?pwd=MzFxRmVEd29rN1FQdWdLa2JqeE5Mdz09

Se vi ankoraŭ ne scias, kiel ludi la ludon, spektu registraĵon ĉe Jutubo: https://youtu.be/yYi2IGC62zw

Regulojn en la ĉeĥa vi povas legi ĉe https://czechgames.com/files/rules/codenames-rules-cz.pdf

**Lingvo:** Esperanto

**Kiam:** la 1-an de marto 2022 je la **17.30** h. (**atentu**, jam je la kvina kaj duono!)

**Kie: La renkontiĝo okazos rete per programo Zoom**

Ni rekomendas, ke vi uzu aŭskutilojn kun mikrofono por preventi eĥon. Sed ne estas bezonata, vi povas uzi mikrofonon en via portebla komputilo (notebook).

Mi sendos ligilon por la renkontiĝo per retpoŝto marde.

★

## Cetera programo en marto

La 8-an **Ĉu programisto estas sorĉisto?** – Milan Kolka rete per Skajpo
La 15-an **Klerigkibernetiko kaj Prof. Helmar Frank** – Josef Vojáček. Občanský klub, Hybešova 65a
La 22-an **Legi en fremdaj lingvoj** – Viktoria Schmidbauer (AT) Hybešova 65a
La 29-an **Vojaĝado per Esperanto** – diskuto el la ĉeĥa rete per Skajpo (cílem diskuze je natočit video v češtině o cestování prostřednistvím esperanta. Prosím, abyste si připravili krátké vystoupení, nejlépe i s ukázáním fotogarfií apod.)

# Programo en aprilo

La 5-an **Otakar Batlička, ĉeĥa Jack London** – Oldřich Arnošt Fischer . Občanský klub, Hybešova 65a
La 12-an *Ankoraŭ neagordita*, rete per Skajpo
La 19-an *Ankoraŭ neagordita*, Hybešova 65a
La 26-an *Ankoraŭ neagordita*, rete per Skajpo
*Mi petas vin, ke vi proponu programon por aprilo kaj majo. Ju pli homoj preparos la programon, des pli bunta ĝi estos.*

★

# Ni rekomendas

- Vizitu **Arbaristan Panteonon**, belegan lokon tuj apud Brno. Reto de firmaj arbaristaj vojoj taŭgaj por promenoj, biciklado kaj promenoj kun infanĉaretoj, belegaj diversspeciaj arboj apude, monumentoj kaj akvofontoj (bedaŭrinde pro longa seko nur kelkaj kun akvo). Propagandisto te tiu ĉi regiono estas esperantisto Miroslav Hruška. La retejo estas ankaŭ esperantlingva. Se vi ĵus ne estas fermita hejme pro la ĉina malsano, iru eksteren kaj promenu en aŭtuna naturo. Faru ion por via sano. La regiono estas atingebla rekte el Brno per publika transporto.
- La 8–10-an de de Aprilo **Instruado de Esperanto Bartošovice**, Bartošovice
- La 9-17-an de Julio, 2022 **56-aj tradiciaj Baltiaj Esperanto-Tagoj**, KLAIPĖDA, Litovio
- La 16-an – 18-an de Septembro 2022 **Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio**, Pardubice

★

Pozvánky Vám chodí, protože jste členy klubu nebo příznivci, kteří souhlasili se zasíláním pozvánek. Souhlas můžete kdykoliv odvolat, stačí to napsat v odpovědi na tento e-mail.

Program klubu můžete též zjistit:

- na našich webových stránkách (https://www.esperantobrno.cz/index.php/eo/aprogramo),
- na naší stránce na Facebooku (https://www.facebook.com/esperantobrno/)
- a na Eventa servo (https://eventaservo.org/o/EO_Brno)

Nahrávky proběhlých přednášek a některých dalších programů naleznete na našem kanálu na Youtube (https://www.youtube.com/channel/UCQLClocHDdrb9TaHggRM5cA).

Náš program budeme nadále zveřejňovat na našem webu, Facebooku a na Eventa servu. Zejména Eventa servo považujeme za hlavní zdroj informací o esperantských akcích. Na webu esperanto.cz budeme zveřejňovat pouze celostátně významné akce (jako je třeba oslava výročí klubu) a on-line schůzky.

Milan Kolka
prezidanto